

Heinrich Heine, Printemps salut <i>tradukita de Ludwig Emil Meier</i>	Heinrich Heine, Softe vibras tra l'animo <i>tradukita de Kálmán Kalocsay</i>	Heinrich Heine, Milde fluas tra la kor' <i>tradukita de Valentin Melnikov</i>
Iras ĉarma sonoret' Tra de mi animon. Sonu printemo kantet' En la malproksimon!	Softe vibras tra l'animo' melodi' tenera, flugu al la malproksim', kanto primavera!	Milde fluas tra la kor' kanto primavera. Flugu, melodi-sonor', en la vast' aera.
Ĝis la dom' forsonu vi, Kie floroj pendas! Diru al la roz', ke mi Saluteton sendas.	Flugu al florbeda dom', kaj se tie ĉarme ridos roz', en mia nom' sin salutu varme.	Flugu longe, sen ripoz', super domoj flutu. Se troviĝos tie roz' – gin de mi salutu.
<i>Traduko de la Germana poemo "Frühlingsbotschaft" de Heinrich Heine (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de Ludwig Emil Meier (*1847-02-16 – †1919) en 1908.</i>	<i>Traduko de la Germana poemo "Frühlingsbotschaft" de Heinrich Heine (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de Kálmán Kalocsay (Kalmano Kaločajo, *1911 – †1976).</i>	<i>Traduko de la Germana poemo "Frühlingsbotschaft" de Heinrich Heine (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de Valentin Melnikov.</i>
Arg-527-1045 (2010-03-14 15:53:26)	Arg-527-1088 (2010-05-27 11:29:19)	Arg-527-1044 (2010-03-15 17:53:18)
<i>Tiu ĉi esperantigo de la poemo estas vere iom fuĝe tradukita. Ĝi aperis en programo de koncerto el la jaro 1908 (laŭ informo de la dana s-ano Lars Kromann [lars.kromann@mail.dk]). Pri Ludwig Emil Meier rigardu ankaŭ la vikipedian retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Emil_Meier. Li verkis interalie la kant-libreton "Esperantista Kantaro", kiu aperis en 1907 ĉe la Esperanta eldonejo de Hans Theodor Hoffmann en Berlino.</i>	<i>El la poezia volumo "Kanzonoj de Heine".</i>	<i>Tiu ĉi poem-esperantigo estas - kun permeso de s-ro Valentin Melnikov - prenita el ties reta kolekto http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov/. Vidu: http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov/Heine.html. Vidu ankaŭ: http://www.esperanto-mv.ru/Melnikov/index.html.</i>